Christian Morgenstern,

# La anĝelo:

*tradukita de Willy Nüesch*

Ho se vi scius, kiom la vizaĝ'
ŝanĝiĝas, se vi meze en rigard'
silenta, pura, liga vin al mi
vin ene perdas, de mi turnas vin!
Kiel pejzaĝ', ankoraŭ hela ĵus,
nubiĝas ĝi, de vi elbaras min.
Atendas tiam ofte longe mi
silente. Se mi homus kiel vi,
mortigus min turment' pro amrifuz'.
Sed donis paciencon patr' al mi
senfinan, kaj neŝanceleble do
mi vin atendas, ĝis ke venos vi.
Eĉ ĉi riproĉon mildan prenu ne
riproĉo, sed mesaĝo ĉasta nur.

*Traduko de la Germana poemo "Der Engel:" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Willy Nüesch *(Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, ∗1927-05-09).*

*Arg-143-286 (2004-03-01 08:38:32)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Brückfeldstr. 11, CH-3012 Bern, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56)donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*

Christian Morgenstern,

# Der Engel:

O wüßtest du, wie sehr dein Antlitz sich
verändert, wenn du mitten in dem Blick,
dem stillen, reinen, der dich mir vereint,
dich innerlich verlierst und von mir kehrst!
Wie eine Landschaft, die noch eben hell,
bewölkt es sich und schließt mich von dir aus.
Dann warte ich. Dann warte schweigend ich
oft lange. Und wär ich ein Mensch wie du,
mich tötete verschmähter Liebe Pein.
So aber gab unendliche Geduld
der Vater mir und unerschütterlich
erwarte ich dich, wann du immer kommst.
Und diesen sanften Vorwurf immer nimm
als Vorwurf nicht, als keusche Botschaft nur.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31).*

*Arg-143-285 (2004-01-31 15:27:02)*

*Die von Herrn Willy Nüesch verfasste Übersetzung ist in der internationalen Literaturzeitschrift "Fonto", Nr. 274 vom Oktober 2003, erschienen.*